



**Kiu kreis Esperanton ?**



**Kiu estas via telefonnumero?**



**Kiun deserton vi elektas ?**



**KALENDARO 2016**

	januaro	februaro	marto
lundo	4 11 18 25	1 8 15 22 29	7 14 21 28
mardo	5 12 19 26	2 9 16 23	1 8 15 22 29
merkredo	6 13 20 27	3 10 17 24	2 9 16 23 30
ĵaŭdo	7 14 21 28	4 11 18 25	3 10 17 24 31
vendredo	1 8 15 22 29	5 12 19 26	4 11 18 25 1
sabato	2 9 16 23 30	6 13 20 27	5 12 19 26 2
dimanĉo	3 10 17 24 31	7 14 21 28	6 13 20 27 3

**Kiun daton ni havas hodiaŭ ?**



**Kiujn lingvojn vi parolas ?**



**Kreis Esperanton Ludoviko Zamenhof.**



**Ĝi estas la 09 87 65 43 21.**



**Mi elektas la pomtorton.**



**KALENDARO 2016**

	januaro	februaro	marto
lundo	4 11 18 25	1 8 15 22 29	7 14 21 28
mardo	5 12 19 26	2 9 16 23	1 8 15 22 29
merkredo	6 13 20 27	3 10 17 24	2 9 16 23 30
ĵaŭdo	7 14 21 28	4 11 18 25	3 10 17 24 31
vendredo	1 8 15 22 29	5 12 19 26	4 11 18 25 1
sabato	2 9 16 23 30	6 13 20 27	5 12 19 26 2
dimanĉo	3 10 17 24 31	7 14 21 28	6 13 20 27 3

**Hodiaŭ estas la 8a de marto 2016.**



**Mi parolas la francan, la anglan kaj la esperantan.**



**Kiom la patrino aĝas ?**



**Kiom kostas la pomoj ?**



**Kiom da citronoj vi deziras ?**



**Kiom longa estas la vojo ?**



**Kioma horo estas nun ?**



**La patrino aĝas tridek ses jarojn.**



**La pomoj kostas po 4 €n por kilogramo.**



**Mi deziras 2 citronojn.**



**La vojo estas du kilometrojn longa.**



**Estas nun la oka kaj tridek kvin.**



**Kie estas la plej proksima apoteko ?**



**De kie vi venas ?**



**Kien la knabo iras ?**



**Kial li timas ?**



**Kial li tiom hastas ?**



**La apoteko staras dekstre je la stratangulo.**



**Mi venas de Londono.**



**La knabo iras lernejon.**



**Li timas ĉar li vidas fantomon.**



**Li hastas ĉar li malfruas.**



**Kiel fartas  
Julo ?**



**Kiom longe daŭros  
la filmo ?**



**Kiel fari omleton ?**



**Kies tiu sako estas ?**



**Ĉu vi konas la  
landon, kies ĉefurbo  
estas Seulo ?**



**Julo fartas malbone,  
li estas febra.**



**La filmo daŭros  
2 horojn.**



**Por fari omleton, ni  
devas rompi ovojn.**



**Tiu sako estas  
la mia.**



**Jes, tiu lando estas la  
Korea Respubliko.**



**Ĉu vi konas la  
ĉefurbon de Brazilo ?**



**Ĉu vi akceptas  
kredit-karton ?**



**Kiam la  
vendejo fermiĝas ?**



**Kiam ni riparu ?**



**De kiam ĝis kiam  
estas aŭtuno ?**



**Jes, la ĉefurbo de  
Brazilo estas  
Brasilia.**



**Ne, mi akceptas nur  
kontantan pagon aŭ  
ĉekon.**




**La vendejo fermiĝas  
je la 19a.**



**Ni riparu kiel eble  
plej baldaŭ.**



**Estas aŭtuno de la  
22a de septembro ĝis  
la 20a de decembro.**



**Kia estos la vetero morgaŭ ?**



**Kia estas Ŝanhajo ?**



**Kio okazis en Hiroŝima ?**




**Kio estas ĉi tiu simbolo ?**



**ktp**

**Kion signifas k.t.p. ?**



**Morgaŭ, la vetero estos nuba kaj malvarma.**



**Ŝanhajo estas grandega urbo.**



**En Hiroŝima, multaj homoj mortis pro la atombombo en 1945.**



**Ĝi estas simbolo de la paco.**



**ktp**

**k.t.p. signifas : kaj tiel plu.**

Dorsoj de la kartoj.

Elektu la paĝon 7 aŭ 8 laŭ la reversa senco de la folio.



Dorsoj de la kartoj.

Elektu la paĝon 7 aŭ 8 laŭ la reversa senco de la folio.





# Ludreguloj

# Demandoj Respondoj

## La ludocelo :

Celas parigi kartojn. Paro konsistas el demanda karto kaj responda karto.  
Paro ekzemplo ci-dekstre :

## Antau la ludo :

Elektu la nombro da kartoparoj laŭ la nombro da ludantoj.

Ekzemplo :

3 ludantoj	15 paroj	disdonu po 7 kartojn	9 kartoj en talono
4 ludantoj	16 paroj	disdonu po 6 kartojn	8 kartoj en talono

Miksu aparte la demandajn kartojn kaj la respondajn kartojn.

Disdonu ĉiujn demandajn kartojn. Disdonu po 2 de la respondaj kartoj, la ceteraj iĝas dorsoflanke la talono.

Ĉiu ludanto kontrolas ĉu li havas paron, se jes, li surtabligas ĝin antaŭ si.



## Por ludi :

La ludanto petas de iu la respondon por unu el siaj demandaj kartoj.

Ekzemplo :

Marko, "Kia estas le vetero ?"

"La vetero estas suna kaj varma."

Kiam la kontraŭulo havas la taŭgan karton, li respondas kaj donas la karton. La ludanto surtabligas la paron kaj li rajtas ludi denove.

Petro, "Kioma horo estas ?"

Mi ne povas respondi.

La ludagado de la ludanto haltas kiam li ne ricevis la bonan respondon, li elprenas karton el la talono. La sekva ludanto ekludas. La ludantoj ludas laŭvice.

**Aparta kazo :** kiam ludanto ne plu havas demandajn kartojn, li rajtas respondi al antaŭe audita demando por surtabligi paron.

Maria, "estas la kvara" respondas al via demando : "Kioma horo estas ?"

## Fino de la partio :

La ludo daŭras ĝis la malkovro de ĉiuj paroj. La gajnanto estas la unua ludanto kiu ne plu havas kartojn en mano.